

# Unuo 10

## *Kion ni celas pri Universitato kaj Esperanto*

### Enkonduko

Kiam oni pensas pri la rilato inter Universitato kaj Esperanto, la kutimo estas nur atendi pri du aferoj: (1) la realigo de Esperantaj kursoj por studentoj, kaj (2) la esploro pri interlingvistiko. Ankaŭ kelkaj aldonas la daŭrigan ĉeeston de Esperanto, forme de grado, postgrado, katedro ktp.

Kutime esperantistoj reagis tre energie, eklaboras rapide kaj ankaŭ rapide atingas rezultojn. Sed tiuj ne ĉiam estas bonaj nek bezonataj. Ne estas kutimo eklabori demandante al aliaj, esplorante pri antaŭaj agadoj, ktp.

Nun la rilato inter Universitato kaj Esperanto reaktiviĝas ĉefe danke al Nitobe simpozio de Lisbono, la revivigo de la ILEI-a komisiono pri universitato kaj la ESF-a celo stimuli la ĉeesto de interlingvistiko en universitatoj.

Gravegas ke ĉi tiu nova energio bone realigu. Pro tio oni bezonas pripensi kaj agadi, ambaŭ samtempe. Ambaŭ devus komenciĝi per esploro ne nur pri kio jam estas farita, sed ĉefe pri kion oni deziras. "Oni" rilatas al homoj kiuj jam pripensis kaj agadis/as, kaj al institucioj kiuj jam faris/as pri tia flanko el Esperantujo.

### Realigo

Ĉi tiu esploro temas pri kolekto de bone vicordigitaj intervjuoj kaj aldono de Delfia metodologio. La unua etapo temas pri unuopaj intervjuoj al ĉiu respondeculo pri la universitata flanko el la Esperantaj institucioj. La dua etapo konsistas el daŭrigo de la intervjuoj sed al esperantistoj kiuj individue aŭ grupe respondecas pri gravaj agadoj pri Universitato kaj Esperanto.

La rezultoj faciligos aranĝi la finan etapon: uzo de Delfia metodologio, kiu konsistas el grupa skriba neĉeesta esplorado. En la unua fazo ĉiuj ricevas mallongan raporton pri la rezultoj kaj malfermitan demandaron pri opinioj, impresoj, proponoj. La respondoj estas uzataj por aranĝi duan raporton, kiu montros komunajn kaj malsamajn vidpunktojn, kaj aldonos duan malfermitan demandaron. La metodo daŭras ĝis atingi stabilon, nome konkludaron kiu ne ŝanĝiĝas inter du fazoj. Estas fama bona metodo por intervjui fakularon.

### Institucioj intervjuendaj

Ĉiuj el ili estas Esperantaj organizoj, kiuj havas komisionon, sekcion aŭ gravan enhavon rilate al universitatoj:

ILEI, UEA, ESF kaj AIS. Ĉiu el ili faciligos kontakton kun la respondeculo pri la universitata flanko.

### Esperantistoj intervjuendaj

Pluraj esperantistoj amasas sperton kaj scion pri tia rilato. Estas devigo intervui ilin, pere de la duobla metodologio unuopa intervjuo + Delfio.

Al kiu	Ĉefe pro kio
Chen Haosu	Univ. Esperanto-konsilio
Dennis Keefe	Universitato de Esperanto
Germain Pirlot	Ĉiujara antaŭa raporto
Ilona Koutny	Postgrado UAM
Juan Diego Díaz	Nitobe-a raporto
Katalin Kovacs	Edukado.net
María C. de Armas	Asocio Univ k. E-o
Renato Corsetti	Retlisto Universitato
Sabine Fiedler	Interlingvistiko

Kompreneble, ni plej eble atingos malsamajn konkludojn laŭ malsamaj fonaj kulturoj kaj landaj spertoj. Pro tio, al ĉi tiu listo oni nepre devas enmeti minimume unu universitatan instruiston el ĉiu kontinento. Ĉiu universitatano elektita estas aŭ estis zorganto de kurso, esplorado aŭ alia Esperanta agado en sia universitato.

### Mona subteno

La esploro bezonas lertan esploriston, kiu eble povus labori senpage, kiel kutime ni faras. La esploristo zorgos pri la dezajno, la metodologia kvalito, la realigo de la intervjuoj, la analizado de datumoj kaj la redakto de la finaj raportoj (kelkaj el ili konkretiĝos laŭ kutimaj universitataj publikigoj). La esploro bezonas ankaŭ estipendiulon, kiu zorgos pri (1) esplori pri intervjuindaj institucioj kaj esperantistoj, (2) agordi rendezuojn, (3) transskribi intervjuojn por poste analizi la rezultajn datumojn, (4) sendi la demandarojn, ricevi la respondojn kaj atentigi partoprenantojn pri la procezo, (5) kaj apogi la esploriston dum la esplorado.

Oni bezonas minimume 6 monatojn. La stipendio povas konkretiĝi laŭ la kalkulo po 15 horojn semajne.